

DICHIARAZIONE SULL'ESSENZA DELL'ESPERANTISMO

(Accettata nell'ultima seduta di lavoro del Congresso di Boulogne: Seduta del 9 Agosto 1905)

Poiché sull'essenza dell'esperantismo molti hanno una idea assai falsa, noi firmatari, rappresentanti dell'Esperantismo in diverse nazioni del mondo, convenuti al Congresso Internazionale Esperantista in Boulogne-sur-Mer, abbiamo trovato necessario, su proposta dell'autore della lingua Esperanto, fornire i seguenti chiarimenti:

1. L' Esperantismo è l'impegno a divulgare in tutto il mondo l'uso della lingua neutralmente umana che, **non ingerendosi nella vita interna dei popoli e non avendo affatto l'obiettivo di estromettere le lingue nazionali esistenti**, darebbe alle persone di nazioni diverse la possibilità di comprendersi reciprocamente, potrebbe servire come lingua conciliatrice delle pubbliche istituzioni in quelle terre in cui diverse nazioni combattono tra loro per la lingua, e in cui potrebbero essere pubblicate quelle opere che hanno uguale interesse per tutti i popoli. Ogni altra idea o speranza che questo o quell'esperantista collega all'esperantismo è affare suo puramente privato, del quale l'esperantismo non risponde.
2. Poiché nei tempi odierni nessun ricercatore al mondo dubita ormai del fatto che soltanto una lingua costruita possa essere una lingua internazionale, e poiché, fra tutti i moltissimi tentativi fatti nel corso degli ultimi due secoli, tutti presentano solo progetti teorici, e solo un'unica lingua, l'Esperanto, si è mostrata lingua effettivamente finita, sperimentata sotto ogni aspetto, perfettamente vitale e pienamente adatta in ogni circostanza, per questo gli amici dell'idea di una lingua internazionale, coscienti che continue dispute teoriche non porteranno a niente e che lo scopo può essere raggiunto solo con l'impegno pratico, già da tempo si sono tutti raggruppati intorno alla sola lingua *Esperanto* e lavorano per la sua diffusione e l'arricchimento della sua letteratura.
3. Poiché l'autore della lingua Esperanto fin dall'inizio ha rifiutato una volta per sempre tutti i diritti personali e i privilegi relativi a tale lingua, per questo l'Esperanto è **proprietà di nessuno**, né dal lato materiale né dal lato morale. Proprietario materiale di questa lingua è il mondo intero, e chiunque lo voglia può pubblicare in, o riguardo a, questa lingua tutte le opere che desidera, e può usare la lingua per ogni scopo possibile; proprietari spirituali di questa lingua saranno sempre ritenute quelle persone che saranno riconosciute dal mondo esperantista come i migliori e i più dotati scrittori in questa lingua.
4. L'ESPERANTO non ha nessun legislatore e non dipende da nessuna persona in particolare. Tutte le opinioni e le opere del creatore dell'Esperanto hanno carattere assolutamente *privato*, come le opinioni e le opere di ogni altro esperantista. L'unico fondamento della lingua Esperanto vincolante per tutti gli esperantisti, una volta per sempre, è l'opuscolo **Fundamento de Esperanto**, su cui nessuno ha il diritto di fare modifiche. Se qualcuno viene meno alle regole e ai modelli dati nella suddetta opera, questi non potrà mai legittimarsi con le parole "così vuole o consiglia l'autore dell'Esperanto". Ogni esperantista ha il diritto di esprimere nel modo che ritiene più giusto, così come viene fatto in ogni altra lingua, ogni idea che non può essere espressa opportunamente con il materiale che si trova nel **Fundamento de Esperanto**. Ma, per la piena unità della lingua, si raccomanda a tutti gli esperantisti di imitare quanto più possibile quello stile che si trova nelle opere del creatore dell'Esperanto, il quale ha lavorato di più per e in Esperanto, e meglio ne conosce lo spirito.
5. Esperantista è chiamata ogni persona che conosce ed usa la lingua Esperanto, non importa per quali fini la usa. L'appartenenza a un qualche tipo di società esperantista attiva è raccomandabile ad ogni esperantista, ma non è obbligatoria.

DEKLARACIO PRI LA ESENCO DE ESPERANTISMO

(Akceptita en la lasta laborkunsido de la Bulonja Kongreso: Kunsido de 9-a de Augusto 1905)

Ĉar pri la esenco de la esperantismo multaj havas tre malveran ideon, tial ni subskribintoj, reprezentantoj de la Esperantismo en diversaj landoj de la mondo, kunvenintaj al la internacia Kongreso Esperantista en Boulogne-sur-Mer, trovis necesa laŭ la propono de la aŭtoro de la lingvo Esperanto doni la sekvantan klarigon:

1. *La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu **ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn**, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj. Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la esperantismo, estas lia afero pure privata, por kiu la esperantismo ne respondas.*
2. *Ĉar en la nuna tempo neniu esploranto en la tuta mondo jam dubas pri tio, ke lingvo internacia povas esti nur lingvo arta, kaj ĉar el ĉiuj multegaj provoj, faritaj en la daŭro de la lastaj du centjaroj, ĉiuj prezentas nur teoriajn projektojn, kaj lingvo efektive finita, ĉiuflanke elprovita, perfekte vivipova kaj en ĉiuj rilatoj pleje taŭga montriĝis nur unu sola lingvo, Esperanto, tial la amikoj de la ideo de lingvo internacia, konsciante, ke teoria disputado kondukos al nenio kaj ke la celo povas esti atingita nur per laborado praktika, jam de longe ĉiuj grupiĝis ĉirkaŭ la sola lingvo Esperanto kaj laboras por ĝia disvastigado kaj riĉigado de ĝia literaturo.*
3. *Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas **nenies propraĵo**, nek en rilato materiala, nek en rilato morala. Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn, kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj ; kiel spiritaj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.*
4. *Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo. Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan. La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo **Fundamento de Esperanto**, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon. Se iu dekliniĝas de la reguloj kaj modeloj donitaj en la dirita verko, li neniam povas pravigi sin per la vortoj "tiel deziras aŭ konsilas la aŭtoro de Esperanto". Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimata per tiu materialo, kiu troviĝas en la **Fundamento de Esperanto**, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo. Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.*
5. *Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.*